

MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO (M.E.M.)

Belga Sekcio.

Estimata Samidean(in)o,

Sekve al alvoko de la Nacia Komitato Vietnamio kaj la Nacia Komitato de la "Marŝo" kontraŭ la nukleaj armiloj, kies respektivaj Prezidantoj estas Henri Rolin kaj Piet Frantzen, apartenas al ni vin inviti partopreni al la protestmanifestacio kontraŭ la milito en Vietnamio kies popolo persiste batalas por sia sendependeco.

Se la nunaj regantoj de Usono asertas ke ili estas la ĉampionoj de la libereco, ni nun scias ke tio signifas ke ili volas, eĉ perforte, subpremi aliajn popolojn.

Observu ni la okazantaĵojn en Sud-Amareko, Indociinio, Mez-Oriento, kie ĉiutage fluas sango pro interveno de la jankioj. La dolaroj unue por pagi senskrupulajn starigantojn de obeema registaro, poste, la armiloj por subpremi la ribelantan popolon.

Postulante la foriron de la Usona armeo el Sud-Azio, ni ne nur subtenas la vietnamajn batalantojn sed malhelpas similajn malfeliĉojn al aliaj popoloj.

Ni renkontiĝos ĉe la dekstra angulo de avenue de Stalingrad, proksime de la suda stacidomo,

Dimanĉe la 26 an de aprilo, je la 14 h. 30

kaj esperas vian ĉeeston ĉe la rendezuo.

Bruselo, 20an de aprilo 1970.

La peranto,

J. Coen.